Frédéric Bérat ,

# Ho Normandi'

*tradukita de Adela Schafer*

Ho, ĉe l' reven' de la printempo
post vintra frost' kaj malvarmec'
en mia bela franca lando
la suno brilas en helec'.
Ho, kiam ĉio reverdiĝas,
la hirundar' al Normandi'
revenas, - dum ni malĝojiĝas,
naskiĝolando kara, nur pro vi!

Mi konas Svislandeton belan
kun ĝia neĝomontĉenar',
en Italuj' ĉielon bluan,
Venizon kun la gondolar'.
Sed vidis landon mi nenie
similan al la Normandi';
feliĉa mi nur estis tie
ĉe vi, naakiĝolando, nur ĉe vi!

En ĉiun vivon venas horo,
en kiu ĉesas la revad';
bezonas tiam ĉiu koro
konsolon per la memorad'.
Se ĉesos mia kantinspiro,
mi venos tuj, ho Normandi',
al vi, pro mia korsopiro.
Naskiĝolando kara estas vi!

. . .

Frédéric Bérat ,

# My Normandy

*tradukita de Tony Provencher*

When far from us the Winter flies,
When the world is born to hope anew,
Under France's lovely skies,
When the sun returns in sweeter hue,
When Nature 'round us greener be,
When swallows homeward wing their way,
I love to see my Normandy,
The land that gave to me the light of day.

Switzerland's dales I did behold,
And her chalets and glaciers blue;
I've seen Italian skies of gold,
And the gondoliers of Venice too.
Although these lands enchanted me,
I knew there was no hideaway
More lovely than my Normandy,
The land that gave to me the light of day.

There comes a time, as life unfolds,
That brings an end to reveries.
A time when must the ransomed soul
Revisit cherished memories.
When time has chilled my muse and me,
And songs of love are sung away,
I'll see again my Normandy,
The land that gave to me the light of day.

. . .

Frédéric Bérat ,

# Ma Normandie

Quand tout renaît à l'espérance,
Et que l'hiver fuit loin de nous,
Sous le beau ciel de nôtre France,
Quand le soleil revient plus doux,
Quand la nature est reverdie,
Quand l'hirondelle est de retour,
J'aime à revoir ma Normandie!
C'est le pays qui m'a donné le jour.

J'ai vu les champs de l'Helvétie,
Et ses chalets et ses glaciers;
J'ai vu le ciel de l'Italie,
Et Venise et ses gondoliers.
En saluant chaque patrie,
Je me disais : aucun séjour
N'est plus beau que ma Normandie!
C'est le pays qui m'a donné le jour.

Il est un âge dans la vie,
Où chaque rêve doit finir,
Un âge où l'âme recueillie
A besoin de se souvenir.
Lorsque ma muse refroidie
Aura fini ses chants d'amour,
J'irai revoir ma Normandie!
C'est le pays qui m'a donné le jour.

. . .

*Traduko de la Franca poemo "Ma Normandie" de Frédéric Bérat en Esperanton de* ADELA SCHAFER *(plumnomo: Ad. Ŝefer, ∗1865-02-11).*

*Arg-1029-2087 (2014-05-29 17:28:49)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Pri la tradukintino vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Louisa_Frederica_Adela_Schafer`.

*Traduko de la Franca poemo "Ma Normandie" de Frédéric Bérat en la Anglan de Tony Provencher.*

*Arg-1029-2088 (2014-05-29 19:58:50)*

*La kanto estas aŭdebla en* `http://manormandie.snoupi.com/music`. *The website of Mr. Provencher can be found at* `http://tonysmusic.snoupi.com/home2`.

*Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas Frédéric Bérat , publikigita 1837.*

*Arg-1029-2086 (2014-05-29 14:20:40)*

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en* `http://nuspel.org/Normandie.html`. *Pri la verkinto vidu la vikipediejon* `http://fr.wikipedia.org/wiki/FrΓκdΓκric_BΓκrat`. *La kanto estas aŭdebla en* `http://nuspel.org/Normandie.html`. *Vidu ankaŭ:* `http://manormandie.snoupi.com/lyrics`.